Die Veränderungen in der Altersstruktur und Zahlungsfähigkeit der Mitglieder gehen auch mit Verschiebungen im ideologischen Bereich einher. Die Bedeutung von »Klassenkampf« wird z.B. zunehmend in Frage gestellt, insbesondere von den jüngeren Mitgliedern. Die Anziehungskraft der SAT im Osten hängt mit einigen Faktoren zusammen. Erstens, hallet der SAT in den östlichen Ländern zum Teil das romantische Image einer oppositionellen Organisation an, weil sie dort bis Ende der 80er Jahre nicht offen arbeiten durfte. Damit hängt zusammen, daß sie in diesen Ländern nicht von Wendehälsen getragen wird, wie dies bei der »bürgerlichen« (früher systemtreuen) Esperanto-Bewegung teilweise der Fall ist. Ein weiterer Grund dürfte derjenige sein, daß die »bürgerliche« Esperanto-Bewegung in manchen Ländern von nationalistisch eingestellten Kräften beeinflußt wird. Dies drängt moderate Leute in Richtung SAT ab. Die SAT scheint sich zur Zeit mehr und mehr hin zu einem amorphen Sammelbecken »progressiver« EsperantistInnen zu entwickeln. Bei den Umwälzungen und der massiver Verelendung in Osteuropa bleibt noch zu hoffen, daß die SAT eine den Umständen entsprechend kämpferi-

sche Linie einschlägt und das glänzende Verständigungsmittel Esperanto den antikapitalistischen Kräften zur Verfügung stellt. Trotz ihrer zahlenmäßigen Schwäche und aller anderen Mängel, beweist die SAT immer wieder,

Auszug aus den Statuten der SAT

1. Unter dem Namen »Sennacieca Asocio Tutmonda« wurde eine Vereinigung mit den folgenden Zielen gegründet:

- a) die internationale Sprache ESPERANTO für die Klassenziele der weltweiten Arbeiterschaft zu nutzen;
- b) so gut und so würdig wie möglich die gegenseitigen Beziehungen der Mitglieder zu fördern, um in ihnen einen starken Sinn für die menschliche Solidarität zu schaffen;
- c) die Mitglieder so zu unterrichten, zu bilden und aufzuklären, daß sie die fähigsten und besten sog. Internationalisten werden;
- d) in den Beziehungen zu anderssprachigen Organisationen, die analoge Ziele wie die SAT verfolgen, als Vermittler zu dienen;
- e) vermittelnd und unterstützend bei der Schaffung einer Esperanto-Literatur zu wirken, die sowohl aus Übersetzungen als auch aus Originaltexten besteht, und die die Ziele unserer Vereinigung widerspiegelt.

Da SAT keine parteipolitische, sondern nur eine bildende, aufklärende und kulturelle Organisation ist, sollten die Mitglieder Verständnis und Toleranz den politischen und philo-

sofischen Schulen oder Systemen, auf die sich die verschiedenen klassenkämpferischen Arbeiterparteien und Gewerkschaftsbewegungen gründen, entgegenbringen. Durch den Vergleich von Fakten und Ideen, sowie durch freie Diskussion will SAT bei ihren Mitgliedern die Dogmatisierung der politischen Lehren, die sie in ihrer jeweiligen Umgebung erhalten, unmöglich machen.

Kurz gesagt, SAT setzt sich das Ziel, langfristig durch die weltweite Anwendung einer rationell durchdachten Sprache (Esperanto) die Schaffung rationell denkender Geister zu fördern, die fähig sind, Ideen, Thesen und Tendenzen gut zu vergleichen, richtig zu verstehen und auszuwerten, die daher auch fähig sind, selbständig den Weg zu wählen, den sie für den direktesten oder begehrtesten halten, um die Klasse zu befreien und die Menschheit zu einer möglichst hohen Stufe der Zivilisation und Kultur hinzuführen.

[V.I.S.d.P.: Gary Mickle]

[hier Kontaktadresse von Maldekstra Forumo]

La sekvonta teksto estis antaŭnelonge farita por la Interreto de Sebastian Hartwig – bonvolu legi pri tio sur la paĝoj 4 kaj 5 de la Magazino.

Sennacieca Asocio Tutmonda Nationenunabhängiger Weltbund

Die S.A.T. ist ein Zusammenschluss linker Strömungen von AnarchistInnen über Grüne und SozialdemokratInnen bis hin zu KommunistInnen. Ihre Aufgabe ist es, einen

ständigen Dialog zwischen den verschiedenen Strömungen der linken Bewegung herzustellen und so eine Dogmatisierung zu verhindern. Sie ist eine kulturelle und bildende

Institution, die die ArbeiterInnen und Lohnabhängigen im Klassenkampf unterstützt.

Der Begriff *Klassenkampf* im Statut der S.A.T. stammt aus ihrer Gründungszeit in den 20er Jahren und ist inzwischen auch in der S.A.T. selbst stark umstritten. Ein Großteil der Mitglieder hält ihn für heute überholt und missverständlich. Die weitere Entwicklung bleibt abzuwarten.

Die Arbeitssprache der S.A.T. ist nur Esperanto. Sie gibt ein internationales Monatsblatt in Esperanto heraus, den *Sennaciulo*. Zusätzlich dazu haben die verschiedenen Plattformen zum Teil eigene Rundbriefe. Alljährlich veranstaltet die S.A.T. einen internationalen Kongress. Dieses Jahr (1998) fand er in

Odessa statt, nächstes Jahr in Karlsbad. An dem Kongress nehmen durchschnittlich 200 bis 300 Menschen teil.

Eugène Lanti, Gründer der S.A.T.:

Die geistige Auseinandersetzung zwischen den Proletariern der verschiedenen Länder findet in Wahrheit nur durch die Vermittlung polyglotter Intellektueller statt. Darum ist die Tätigkeit der S.A.T., die darauf abzielt, die Arbeiter der ganzen Welt unmittelbar zusammenzubringen und einander kennenlernen zu lassen, revolutionär im innersten Wesen.

98-08-18; Sebastian Hartwig

Ĉi tiu teksto estas germana traduko (farita de GM) de informa kaj varba teksto, kiun S.A.T.E.B., la brita LEA, lokis en la Interreto.

Esperanto – die Sprache der Freiheit

In vielen Ländern hindern schlechte gesellschaftliche Bedingungen und politische Unterdrückung Menschen daran, ihr volles Potential zu erreichen, und sie wirken sich oft auf deren physische und psychische Befindlichkeit aus. Durch Esperanto hilft die nationenunabhängige Organisation S.A.T. Menschen aus aller Welt, zu kommunizieren, sich auszusprechen und ihre Erfahrungen untereinander zu teilen. Er hilft ihnen, ein Gefühl der Zugehörigkeit zu einer Menschheit zu entwickeln, in der jedes Individuum respektiert und geschätzt wird, und in der jeder gleiche Rechte hat.

S.A.T. gründet sich auf Prinzipien des Verständnisses und der Solidarität, und ist gegen jede Form der Unterdrückung. Weltweit hält er Kongresse ab und verteilt Information.

Warum Esperanto lernen?

- Esperanto gehört keiner Nation und deshalb kommunizieren seine Sprecher zu gleichen Bedingungen. Bei jeder anderen Sprache hat der Muttersprachler immer einen Vorteil.
- Esperanto fördert grenzüberschreitende Freundschaft und Meinungsfreiheit, ohne Rücksicht auf Rasse oder Glaubensbekenntnis.
- Esperanto ist wegen seiner regelmäßigen Grammatik und Aussprache die leichteste Sprache, die Sie lernen können. Er läßt sich in einem Bruchteil der Zeit lernen, die für andere Sprachen gebraucht wird.
- Esperanto wird in über 80 Ländern der Welt gesprochen.
- Esperanto ist die vernünftige und kostengünstige Lösung bei Übersetzungsproble-

men in großen internationalen Organisationen.

- Esperanto bedroht nicht die Kultur oder Sprache eines Landes, sondern bietet sich allen als gemeinsames Verständigungsmittel an.
- Sie können anfangen, Esperanto mit einem kostenlosen Briefkurs in zwölf Lektionen zu lernen. Wenn Sie einmal sprachkundig sind, können Sie bei S.A.T. mitmachen und Kongresse besuchen.

Warum Mitgliedschaft in S.A.T.E.B. (Sennacieca Asocio Tutmonda En Britio)?

S.A.T.E.B. ist die britische Sektion der nationalen unabhängigen Weltorganisation S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda), eine weltweite Arbeiterbewegung, die zu sozialisti-

schen, feministischen, Friedens-, Gewerkschafts- und Umweltfragen aktiv ist. S.A.T. benutzt Esperanto als Arbeitssprache und zielt durch den Gebrauch von Esperanto darauf, fortschrittliche Menschen, Organisationen und Arbeiter aller Länder in die Lage zu versetzen, Ideen auszutauschen und sich auf einer Grundlage der Gleichheit über nationale Schranken hinweg zu begegnen. Mitglieder von S.A.T.E.B. bekommen die Vierteljahresschrift *La Verda Proleto*.

Um S.A.T.E.B. beizutreten bzw. um weitere Information zu erhalten, kontaktieren Sie bitte [Kontaktadresse von S.A.T.E.B.]

©1996, L.E. Simons, por SAT-Esperanto.

Jen malgranda eltiraĵo el kontribuo verkita de Will Firth por *Lexikon der Anarchie*, pli precize, el la ĉapitro *Esperanto und Anarchismus*. Ankaŭ ĝi tuŝas la historion de SAT.

Im August 1921 trafen sich in Prag 79 Arbeiter aus 15 Ländern. Sie gründeten die bereits erwähnte SAT, eine auch heute aktive Organisation antinationalistischer Linke. Ihren Höhepunkt erreichte die SAT in den Jahren 1929-30. Damals hatte sie 6.524 Mitglieder in 42 Ländern, 1997 sind es weniger als 1.500 Mitglieder. Die Gründung der SAT und deren anfangs konsequente Abschottung gegenüber der bürgerlichen Eo-Bewegung war Ergebnis der allgemeinen politischen Entwicklung jener Zeit, die auch durch den damals doktrinär gehandhabten politischen Neutralismus der bürgerlichen Eo-Bewegung begünstigt wurde.

Im März 1925 begrüßte eine "Berliner Gruppe anarcho-syndikalistischer Esperantisten" den in Amsterdam stattfindenden II. Kongreß der Internationalen Arbeiter-Assoziation (IAA). Sie sprach davon, daß Eo in den Reihen der deutschen IAA-Sektion FAUD "schon derart Fuß gefaßt hat, daß sie jetzt eine Weltorganisation von Esperantisten auf freiheitlich-antiautoritärer Grundlage gebildet

hat". Das ist vermutlich eine Anspielung auf die T.L.Eo.S. (etwa: Weltweite Liga Staaten-unabhängiger Esperantisten), die in den 20er Jahren gegründet wurde, da die SAT anfangs stark kommunistisch beeinflusst war. Anscheinend ging die TLES später in der SAT auf.

Besonders stark war die Arbeiter-Eo-Bewegung in Deutschland und der UdSSR. Unter anderen wurde 1923 in der sowjetischen Ukraine die "Wissenschaftliche Anarchistische Bibliothek der Internationalen Sprache" (I.S.A.B.) gegründet, die Kropotkins *Ethik*, Borowojs *Anarchismus* und andere Werke für eine internationale Leserschaft auf Eo herausgab. Anarchistische Esperantisten entfalteten ihre Aktivitäten in dieser Zeit nicht zuletzt im fernen Osten. So gab ab 1913 in China Liu Shifu (Spitzname: Sifo) die Zeitung *La Vocho de l' Popolo* heraus. Eo spielte eine bescheidene Rolle in den Internationalen Brigaden während des Spanischen Bürgerkriegs (1936-39).

Ok jaroj da nomadismo ĉirkaŭ la mondo

de Maryvonne Robineau

Agrikulturisto enradikiĝinta en sia hejmgrundo, Bruno iam forlasis siajn kampojn por vojaĝi kun Maryvonne tra la mondo. En li ardas la flamo iri ĝis la limoj de la Tero por partopreni en la ĉiutagaĵoj de la homoj, plekti ligilojn, percepti la aliulon en ĝia aŭtenteco, en ĝia vero.

Animataj de la nesatigebla scivolo travivi la kondiĉon de fremdulo, ni estas forirontaj kvar jarojn. Ni ja bezonos ok por renkonti la homojn tra iliaj kulturoj kaj agrikulturoj, ok jarojn por konatiĝi kun kelkdekkvino da landoj. Vojaĝo postulas tempon, se oni volas sorbiĝi je la sento de la vizititaj popoloj.

Vojaĝi ne signifas esti spektanto: por pli bone ekkoni la homojn, ni partoprenos en ilia laboro, interŝanĝante la laciĝon de niaj muskoloj kontraŭ gastigo kaj nutrado, ni vivos kun iliaj familioj, dividos kun ili la manĝojn, kunvivos iliajn festojn, ĝojojn kaj malfeliĉojn.

La kamparana mondo estas la privilegia medio de niaj renkontoj (sed ni ankaŭ spertos familian vivon en tre diversaj medioj, ĉe bulgara oficiro, japana kadro aŭ aŭstralia instruisto...) Post volontula laboro en la izraelaj kibucoj, ni rikoltas la lentojn kun Ram Prasad, modesta hinda kamparano, kiu akceptas nin per la jenaj vortoj: «Mi estas feliĉa, ke Dio elektis min por vin akcepti». Elstara kulturo de tiuj, kiuj scias nek legi nek skribi, sed posedas kornoblecon. Ĉiumatene, ni estas sur la kampoj ekde la kvina, por profiti de la relativa malvarmeto. La najbaroj miras kaj venas palpesplori la manojn de tiu stranga

fremdulo kiu kaŭras kun ili sur ties tero. La komuna tasko, nepre universala lingvo, havas la mirindan povon plekti ligilojn.

Kunvivi la ĉiutagecon de la familioj ne ĉiufoje estas facile. Ses monatoj da simpla dieto konsistanta senŝanĝe el rizo, tritikaj platkukoj kaj lentoj, perdis al Bruno pli ol 15 kilogramojn. Vidante lin elĉerpita, senenergia, mi maltrankviliĝas: ni havas nek medikamentujon, nek asekuron, from tiu de Providenco! Saman misnutrado-problemon li spertos en Bolivio, kiam la familio Cruz dividos kun ni siajn ĉiutagajn terpomojn kaj cerealojn.

Enkarcerigite en la betono de la centbraka tokia urbeĝo, ni sufokiĝas kaj indignas pro la konsumadego, la fuŝperado...: ĉu estas ni sur la sama planedo? Feliĉe, la gastigado en familioj kompensas la malfacilaĵojn: Kenzi Muraoka invitas nin en sian vilaĝon; Umiko partoprenigas nin en siajn kursojn pri teceremonio, floraranĝo; en Oomoto ni travivas serenon novjaran nokton... Kaj malavarulo donacas al ni biletojn por Kabuki-teatraĵo. Ne malpli ol 22 familioj akceptas nin hejme dum la naŭ monatoj de nia restado. Tamen nia gvidlibro informis: «la eksterlandaj turistoj havos tre malmulte da ŝanco ekkoni japanan hejmon, ankoraŭ malpli da ŝanco tie tranokti». Ankoraŭfoje ni povas danki al Esperanto.

La lingvo, kiun ni lernis survoje en la bulgara lernejo de Pisanica, fariĝis la vera ŝlosilo de niaj renkontoj kaj, dank' al ĝi, ni povis eniri la intimecon de

multaj familioj. Ĉiuj restas karaj en nia memoro: en Bulgario, niaj unuaj esperantistaj gastigantoj, Cvetan, Stveka kaj aliaj, akceptis nin, malgraŭ la tiama registara malpermeso gastigi eksterlandanojn; hungara altrangulo aranĝis por ni oficialan vojaĝon kun interpretisto,



Ni direktiĝas al Japo K'asa, indiana vilaĝo je 4300 m en la bolivia altebenaĵo.

luksaj restoracioj kaj hoteloj, por ke ni malkovru la tian agrikulturon; Tibor Sekelj, kiu dormigis nin en ĉambro kie maskoj el la kvaranguloj de la mondo strange rigardis nin, forte kuraĝigis nin por nia entrepreno.

Alia kontinento, sama utileco de Esperanto. Jam fervoraj pri la lingvo, ni ĝin instruis al ĝainaj monaĥinoj, en Hindio. Tamen unu lecionon ni ne sukcesis enkapigi al niaj bonegaj lernantinoj: temas pri la sufikso Aĵ. Kiam ni klarigas ke ĝi utilas por esprimi la nocion pri viando, niaj lernantinoj tuj forpuŝas ĝin. «Ne, nepre ne, ni ne bezonas lerni tiun vorton!» ili naŭze ekkrias. Por tiuj striktaj vegetaranoj ne eblas eĉ elparoli la malpiegan vorton!

Esperanto kondukas al ĉio, eĉ al luksaj hoteloj! En longdistanca rondvojaĝo, ĉio povas okazi, la plejmalbono kaj la plejbono. Kun la sama sereneco oni devas akcepti tion, kion proponas la Destino: tranoktadon sur publika benko aŭ unu semajnon ĉe la hotelo Merlin, en Kuala-Lumpur, Malajzio, senpage pro-

ponitan de la direktoro... Esperanto-parolanta!

Ne tiel luksa, sed tiom agrabla estis la restado ĉe Wei Chi, juna ĉina kamparano kiu gastigas nin en sia izolita vilaĝo el provinco Ŝanĥi. Ni ne povas mencii ĉiujn, kiuj tiom kore akceptis nin en Aŭstralio, Nov-Zelando, Usono, Bolivio... Aparte karmemora restos por ni tiu lando, ne nur ĉar de tie devenas Vincent, nia filo adoptita kiam kvarmonata bebo, sed ankaŭ ĉar tie naskiĝis vera amikeco kun Freddy kaj Tomoko, membroj de Pasporta Servo: ni alvenis ĉe ili por tri tagoj kaj... kvin monatojn poste, ni plu gastis ĉe ili!

Sed... Esperanto perdis al mi la fadenon de mia rakonto! Mi devus ankaŭ paroli al vi pri nia laboro en aŭstralia aborigena komunumo, kiu konsciigis

nin pri la respondeco de la blankuloj en la detruo de indiĝenaj popoloj. Aŭstralio, tiu vastega kontinento-lando, ankaŭ donis al Bruno la okazon fariĝi vakero en 600 000-hektara bieno. Kia kontrasto kun Japo K'asa, indiana vilaĝeto en la bolivia altebenaĵo, kie Luis Cruz kultivas 1,15 hektaron dividitan en 34 etetajn parcelojn. Tamen, en tiuj glaciaj solejoj, je 4300-metra altitudo, la kamparanoj daŭre dankesprimas al «Paĉamama», la tero-patrino, kiu estas sufiĉe bonkora por donaci al ili la ĉiutagajn terpomojn.

Ĉu mi povas forgesi en mia rakonto la inviton al geedziĝfestoj en kanaka tribo el Nov-Kaledonio: unu semajnon da

festoj, bankedoj, ceremonioj laŭ la tradiciaro? Aŭ memori – kun malpli da sereneco – pri la tago kiam, en Gvatemalio, ni ricevis mortminacon subskribitan de la gerilo: «Vi disponas tri tagojn por forlasi la landon. Aŭ trafos vin morto!»

Ne eblas ĉion diri pri tiuj ok jaroj. Ok jaroj por trakuri la planedon, renkonte al viroj kaj virinoj en la ĉiutago. Tiujn homojn, ni trovis kiaj ili estas, kiaj estas vi kaj mi, teneraj kaj kruelaj, blankaj kaj nigraj kun iliaj angoroj kaj revoj. Tial, kiel strange estas nomi la alian Fremdulo!

Por scii pli pri tiu eksterordinara aventuro, unu libro:

Ili vivis sur la tero – Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo

240 paĝoj – 8 paĝoj kun koloraj bildoj

Havebla ĉe UEA aŭ Bruno Robineau – 49270 Landemont – Francio

Tel-Fax 02 40 98 78 76 – E-poŝto: Bruno.Robineau@wanadoo.fr

120 FF + sendokosto: 20 FF por Francio – 30 FF por aliaj landoj

LETEROJ AL LA REDAKCIO



skribas Zbigniew Galor, Poznań (PL) (1998 11 05):

Kun granda intereso mi legis «*Kelkajn alineojn ...*» [«... de ankoraŭ verkota Manifesto de hobiuloj» de G. Mickle en *Magazino 24*: red.]. Plej grava ŝajnas al mi komparo de viaj proponoj kun jam ekzistantaj Esperantaj ideotendencoj. Mi ĝuste finis skribi recenzon (mi kunsendas ĝin al vi) de libro de F. Stocker por *Esperanto* kaj ankaŭ per troviĝantaj en la libro distingo mi rigardis viajn

proponojn. La rezulton mi povas prezenti jene:

Sume – kune kun viaj distingo – ideologio de Esperanto-movado ofertas nuntempe sekvajn eblecojn:

- 1) parcelismo, kiu egalas kun TEI,
- 2) raŭmismo,
- 3) universalismo (laŭ Stocker tio estas prceloj traktataj pli mole enkadre de iu pli granda socia idearo, ekz. ekologia), laŭ mi, ĉi tie troviĝas ankaŭ prskribita far vi maldekstra strategio,
- 4) hobiismo.

Problemo, kiun elvokas la hobiismo: ĉu ĝi – rilate al la esperantistaro – ekzistas sufiĉe aparte de aliaj (1, 2, 3) ideologioj? Certe estas plej proksima al raŭmismo. Kiel praktika sinteno hobiismo estas verŝajne realigata en kadre de grupo de la esperantistoj, kiuj *deklaras* sian apartanecon al iu el tiuj ĉi ideologioj (momento de "memmensogo", pri kiu vi skribas). Ja eĉ individua aparteno al UEA ne signifas aŭtomate akcepton de ĝia oficiala ideologio.

Alia afero, tio estas kriterio de *esti hobiulo*. Ĉu laŭ: Esperanta lingvo estas mia hobia? Ĉu laŭ: partopreni Esper-

anto-aranĝojn estas mia hobia? (Tiukaze Esperanto-kono ne estus tiomgrade bezonata).

Se mi devus respondi: kial mi okupiĝas pri Esperanto, mi dirus, ke en diversaj momentoj de mia vivo la respondo estus alia. De la supraj ideologiaj vidpunktoj iliaj ecoj (ne ĉiam nomataj tiel, kiel nun ni nomas la Esperanto-ideologiojn) en diversaj momentoj estis por mi gravaj (ankaŭ hobiismaj).

Nun mi vidas bezonecon klare distingi la individuajn sintenojn al Esperanto kaj la demandon pri la celoj de la esperantistaro kiel movado.

Venis al la redakcio pluraj poŝtartaĵoj de Wolfgang Gunther, kiuj evidentigas la eblecojn de tiu arta ĝenro. Al mi (GM) la estetikaj kvalitoj de tiu arta formo ekplaĉis, kvankam ĝenerale la kampo de arto estas por mi ia nenieslando, en kiu mi ne bone orientiĝas. Mi dividas kun la legantoj angulon de la (multe pli granda kaj ankaŭ kolora) plej lasta alsendita artaĵo. La ĉi-suba versforma kontribuo estas elemento de ĝi (kiun la grafikajo ne montras). Dankon al Wolfgang!

skribis Wolfgang Gunther, 34292 Ahnatal-Weimar (98 11 13)

Esperanto - la pinto de aventura ŝoko!
Esperanto - la pinto de ŝoka aventuro!

Jen la pinto de la rondo:
La psikologio de la stelo,
anarkistoj & komunistoj,
ĉiuj istoj kvazaŭ
estas elfluo de tiu fundamentalaĵo...

Pinto: vireska = unudirekte perforta.
Rondo: ineska = cirkule konserva.

Ĉu?

Disde la. Krome. Sed por & pro.

Ronda pinto - cirkule konserva unudirekta perforto,
ineska viresko

Pinta rondo - unudirekte perforta cirkula konservo,
vireska inesko

Kaj vi?
BV. RONDIGI VIAN STELON!
BV.!

novajoj

Ne forgesu: Devas esti verda stelo kun rondigitaj pintoj!

Kaj jen fino!

Cetere:

La 4-a UN-konferenco pri la klimato
Buenos Ajreso - 98.11.01
(LA IDOJ DE LA KARBOKSOJ)

Blonda harplektaĵo. Blanka hundo.
Altaj akvofaloj. Numeroj drivas.
Haladzaj trotuaroj ktp.
Senbriduloj kaj petolinoj.
Plenpreduloj kaj petroleo.
En la moviĝoj de tiuj gamboj kuŝas jarmiloj.
Emo je lukso. Emo de genoj.
Progreso estas kunfiularo de kukuloj.
Aŭto, petroleo, turismo.
Antropocentrismo, ideologio, eksceso.
Kriu monton, krii valon -
la suno eskapas inferon.
Vi povas provoke konsenti aŭ rifuzi toks-noce.



LEA-Ligilo reaperis

Tiu bulteneto, kiu celas kunligi la LEA-ojn, laŭ decido de la LEA-Komitato ree ekaperas. En la n-ro de 1998 11 la redaktoro Alan Gould proponas ankaŭ interretan informservon por LEA-oj. (GM)

Interretejo de Attac

La interretejo de la asocio Attac, kiu debatigas temojn de kapitalimpostado, precipe la Tobin-imposton, kaj de la financaj merkatoj, serĉas tradukantojn, kiuj esperantigu tekstojn el la paĝaro Alter Davos: <http://attac.org/alterdavos/>. Kontaktu pri tio Alain Cavalier: alcav@club-internet.fr (Service de Presse de SAT-Amikaro 99 02)

SAT-Junulfako kunsidos

La Junulfako de SAT okazigos 1999 02 23 en la pariza sidejo de SAT kunvenon malfermitan al ĉiuj gejunuloj. Informiĝu ĉe: Vinko Markov, 61, Boulevard Vauban, 78180 Montigny le Bretonneux. Tel/Fax : 01 30 57 18 81 (Service de Presse de SAT-Amikaro 99 02)

Sindikatoj serĉataj

Vincent Charlot transprenis de Georges Sossois la taskon de sindikata agado. Li nun serĉas kontakton kun sindikataroj emaj kunlabori por aranĝi tiutemajn kunvenojn en la kongresoj de SAT en Karlovy Vary kaj de UEA en Berlino. Adreso: 10 Square Savorgnan de Brazza, F-94310 Orly (Francio). Tel.: 00 33 (0)1 48 92 63 79; retadreso: esperant@worldnet.fr (GM)

NEKROLOGOJ

Bedaŭrinde je malfrua dato ni eksciis, ke en Dortmund la 4an de oktobro 1998 mortis nia fidela membro

Willi PETIG

Ni kondolencas al lia edzino kaj lia fratino Herta Bellen.

Elvira GÖRKE

edzino de nia asocia membro, kamarado Bruno GÖRKE, Düsseldorf, mortis neatendite 1999 01 03 – naŭ tagojn antaŭ la komenco de sia 71a jaro. Ofte ŝi partoprenis kune kun la edzo okazajojn de S.A.T., LEA/G kaj Naturamikoj. Estis gastama, kiam la LEA/G-grupo de Düsseldorf en la hejmo de ges-roj Görke kunvenis. Ni kondolencas al Bruno kaj pardonpetas, ke ne estis eble partopreni la enterigon.

Libera Esperanto-Asocio
La estraro

(Recenzo: daŭrigo de paĝo 6)

la *Sindikata Terminaro* kaj ekscias, ke temas (Esperante) pri «parta senlabor-eco». La temaro de ĉi tiu terminaro, cetere, estas pli larĝa ol la nomo kredigas – ĝi ampleksas la laborrilatojn kaj la laborjuron ĝenerale.

Jen kelkaj vortoj el la antaŭparolo de Roland ROTSAERT kaj YAMASAKI Seikō, respondeculoj de la Terminara Fakto de IKEF: «Tio ĉi estas esperantigo de la Sindikata Terminaro de la Eŭropa Unio, farante sekvon de tiu de la Ekonomio, Financo, Mono. Ĝi bazas sin sur la malneto fare de sinjoro Hans WIERSCH. Por tiu ĉi versio kontribuis sinjoroj doktoro Werner BORMANN kaj Franz Josef BRAUN. [...] Nia principo estas interalie respekto de akumulo de ĝisnunaj atingoj, precipe de la Internacia Komerca kaj Ekonomika Vortaro (IKEV), 1974, redaktita de sinjoro F. Munniksmā.»

Bedaŭrinde, la antaŭparolo ne tre detalas pri la konsultitaj verkoj kaj disdivido de taskoj inter la nomitaj kunlaborantoj kaj eventualaj aliaj. Ni tamen ekscias, ke temas pri kolektiva verko. Ĝi enhavas 415 numeritajn registraĵojn, kiuj respondas al po unu nocio kaj enhavas la respondajn terminojn en la germana, angla, franca kaj Esperanto. Konvenas al la germanlingva uzanto la alfabeto ordigo laŭ la germana termino. Fine de la libro estas indekso de la Esperantaj terminoj.




Mi trovis malmulte da terminpropoj, kiujn mi malemus sekvi: «patrin-eca protekto» (=Mutterschutz) ŝajnas iom ambigua; la germanaj terminoj *Bummeistreik* kaj *Dienst nach Vorschrift* ne estas samsignifaj, tamen esperantigitaj ambaŭ per «lanteca striko». Sed ĝenerale la terminoj estas trafe kreitaj. Ne necesas substreki, kiom ĝuste ĉi tiu kampo de la terminologia laboro gravas por SAT-medioj.

GM

lingva
angulo

krucvortenigmo



Horizontale

- 2 diferenci (4)
- 6 pro necerta kialo (3)
- 9 sciencisto okupiĝanta pri birdoj (10)
- 11 truo en la tero, el kiu oni ĉerpas akvon [radiko] (3)
- 12 akra longoforma rando de objekto [radiko] (2)
- 13 promeso de submetiĝo farita de vasalo al feŭdestro (5)
- 16 mi kaj vi (2)
- 17 hebreo (4)
- 19 kontraŭulo, kontraŭbatalato (9)
- 21 antikva helena poetkantisto (4)
- 22 malebria (5)
- 25 radiko de sesdek kvar (2)
- 26 postrestaĵo (7)

Vertikale

- 1 malalta, kruda parto de la popolo (10)
- 2 anticipi (9)

- 3 persona pronomo de maskla individuo (2)
- 4 sufikso signanta inflaman malsanon (2)
- 5 amatino de Zeŭso (3)
- 6 nedifina pronomo montranta aferon, ktp. (2)
- 7 kajero por noti fendaĵojn (6)
- 8 domo, en kiu kunvenas framasona grupo (5)
- 10 brando destilita el la suko de la sukerkano [radiko] (3)
- 14 malfermi [neologismo] (4)
- 15 tubeto aŭ aperturo por reguligi la elfluon de likvaĵo aŭ vaporo (5)
- 18 sufikso signanta homon karakterizitan de la kvalito, kiun la radiko signas (2)
- 20 garda deĵoro sur ŝipo (4)
- 23 bleki kiel ŝafo (3)
- 24 subjunkcio signifante "kondiĉe, ke" (2)

Ĉu vi parolas Esperanton hejme?

Kiu esperantumas en la familia ĉiutag-eco, rapide rimarkas ĝuste en la plej koncernaj sektoroj de la leksiko la malvaston de sia lingvoscio. Aperos en 1999 la «vortaro de hejmaĵoj» de la Rondo Familia. Jam konsultebla en la reto:

<http://www.helsinki.fi/~jslindst/denask-1.html>



solvo de
la
krucvort-
enigmo
el
Magazino
24

novaĵoj

(pli da novaĵoj sur paĝo 21)

Retpaĝoj de SAT-dokumentoj kaj pri Lanti

Krom la LEA-paĝaro, pri kiu legu sur paĝoj 4 kaj 5, Sebastian Hartwig prilaboris dum la pasintaj monatoj du ampleksajn Interretajn paĝarojn: *Dokumentoj de SAT* (<http://amor.rz.hu-berlin.de/~h0444wow/sat/>) kaj *Vortoj de k-do E. Lanti* (<http://www2.rz.hu-berlin.de/~h0444wow/lanti/>), alireblaj nun i.a. de sur la ĉefpaĝo de SAT. Tie ili aperas en la naviga kadro sub la rubriko *Diversaj SAT-dokumentoj*. La unua el la paĝaroj inkluzivas la Statuton, la Gotenburgan Konvencion kaj diversajn regularojn de SAT. La dua enhavas la eltiraĵojn el la verkaro de Lanti, kiuj aperis libroforme ĉe la Broŝurservo de SAT sub la sama titolo. (GM)

Contraste raportis pri SIL-renkontiĝo

La ĵurnalo *Contraste* («*Die Monatszeitung für Selbstorganisation*»), dediĉita al demandoj de memhelpo kaj kooperativismo, aperigis en sia numero de 1998 decembro artikolon de Ricarda Buch, kiu reprezentis la germanajn interŝanĝrondojn (*Tauschringe*), pri la internacia renkontiĝo de SIL (sistemoj de interŝanĝoj lokaj) organizita de francaj esperantistoj proksime al Montpellier fine de julio. La renkontiĝo ebligis laŭ la konstato de la aŭtorino al la esperantistoj pli informiĝi pri la celoj de la movado de nemonaj interŝanĝoj, kaj al tiuj lastaj konatiĝi kun la celoj de la esperantistoj. Pli da detaloj en la venonta numero. (GM)

Enhavo:

	<i>paĝo</i>
Alvoko elekti novan estraron kaj decidi pri proponoj (Albert Stephan)	1
La nova kasisto de LEA/G estas Jiri Proskovec	2
Kio estas la celo de SAT? (2)	3
Novaj TTT-paĝoj de LEA/G (Sebastian Hartwig)	4
Specimena retpaĝo <i>Sindikata Terminaro (IKEF/pluraj aŭtoroj):</i> recenzo de G. Mickle	6
Sciigo de la Esperanto-libroservo de Consuelo kaj Manfred Führer anonco: <i>Granda vortaro Esperanta-germana</i>	7 8
INFORMILA SEKCIO: <i>diversaj informilaj tekstoj, kiuj traktas SAT</i>	9
Ok jaroj da nomadismo ĉirkaŭ la mondo (Maryvonne Robineau)	17
LETEROJ AL LA REDAKCIO	19
NOVAĴOJ	21
NEKROLOGOJ	22
LINGVA ANGULO	23
NOVAĴOJ	24

La redakcio petas pardonon pro la malĝustloke faritaj paĝofinoj sur la lastaj kvar paĝoj de la *Info-Beilage*. Temas ŝajne pri difekto en la dosiero, kiun korekti mi ne havis tempon. (GM)